

STARTO

N-ro 4/2022 (285)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



16 –18 septembro 2022
ĈEA-kongreso en Pardubice

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marĉek: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Výbor ĈES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz; (koordinace a reprezentace ĈES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ĈES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.chaloupkova@esperanto.cz (kluby a sekce, konference, granty)

Člen výboru: Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika) fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201,
chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Admi-
stras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

La 18-a kongreso de ĈEA

16 - 18 septembro 2022 Pardubice

La 16-18 de septembro 2022 okazis en Pardubice en junularhejmo kongreso de ĈEA. La programo komenciĝis vendrede per kunveno de AEH, kiun gvidis ĝia prezidanto Petr Angelov. Li transprenis la funkcion post sia avino Jarmila Rýznarová kaj post sia patrino Lenka Angelová. Oni diskutis, ĉu havas sencon teni en Pardubice du organizojn, klubon kaj AEH. Ladislav Hakl atentigis, ke apenaŭ eblus varbi inter junularo por AEH, tial oni decidis restigi ankaŭ la klubon.



Post vespermanĝo sekvis teatraĵo *Ludoj kun diablo*, kiun en malgranda kela klubejo prezentis studenta teatro DOMA el Svitavy sub gvido de Radka Oblouková. La teatraĵo estis rekte elsendata al Jutubo, kie ĝin spektis pluraj personoj.

La vesperon riĉigis per sia rakontado kun bildoj Petr Chrdle, kiu partoprenis en UK Montrealo. En la urbo ĝuste okazis festivalo de seksaj minoritatoj (da tiuj homoj estis eble miliono). El iama Ĉeĥoslovakio venis nur Petr Chrdle kaj

Peter Baláž, la aliaj ĉeĥaj aŭ slovakaj partoprenantoj vivas en Kanado aŭ Usono.



Kiam mallumiĝis, la kongresanoj foriris al proksima stelobservejo, kie ili vidis grandan teleskopon kaj per ĝi planedon Jupitero kaj ĝiajn kvar lunojn, plu ili aŭskultis rakontadon pri loka inventisto Artur Kraus (1854-1930), kiu fondis la observejon.

La ĉefa kongresa traktado okazis sabate matene en la manĝejo. Post raporto pri la agado de la kluboj, kiun prezentis Leonarda Chaloupková, la asocia kasisto Vratislav Hirš konatigis la ĉeestantojn kun la financa situacio de la asocio kaj kun la stato de membrobazo. Kiel nova honora membro de ĈEA estis proklamita Jana Melichárková. Petr Chrdle montris la staton de individuaj membroj de UEA el Ĉeĥio (40 personoj).

Plie li montris siajn novajn eldonaĵojn. Poste V. Hirš kiel prezidanto de elekta komisiono prezentis kandidatojn por la nova asocia komitato: Jiří Tomeček kiel prezidanto, Andrea Švubová kiel kasistino, Josef Kalčík (anstataŭ Hirš) kaj la ceteraj restas: Libuše Hýblová, Leonarda Chaloupková, Miroslav Malovec. La ĉeestantoj la novan komitaton aprobis.



Oni dankis al Libuše Hýblová, kiu dum du periodoj prezidis la asocion, kaj al Vratislav Hirš, kiu dum 14 jaroj zorgis pri la asocia kaso. Li fariĝis honora ĈEA-kasisto.



Posttagmeze Ladislav Hakl gvidis promenon tra la urbo, dum kiu ni vidis kastelon kaj ankaŭ domon, kie aperis la unua lernolibro de Esperanto verkita de tiam 18-jara F.V. Lorenz, tiam estis tie eldonejo Hoblík, sed nun aliaj firmaoj. Ni vizitis ankaŭ evangelian preĝejon, domon kun memortabulo pri Artur Kraus kaj domoj kun memortabulo pri aviadisto Jan Kašpar. Plej kortuŝa

momento okazis sur strato, kie staras benko, kies apogilo plenas de ŝildetoj kun nomoj de homoj, kiuj mortis pro pandemio. Ne mankis Lenka Angelová.

Kvankam ni estis lacaj, ni tamen iris al ekskurso al lokaj fajrobrigadistoj, kiuj montris al ni siajn aŭtomobilojn kun tekniko uzata ne nur por estingado de fajro, sed ankaŭ por liberigo de homoj dum aŭto-akcidentoj (aŭ aliaj akcidentoj), ni vizitis ankaŭ la lokon, kie oni akceptas informojn pri akcidentoj kaj helpas al homoj. Bedaŭrinde ni devis foriri antaŭtempe, ĉar la kuiristinoj en la junulardomo volis iri hejmen post vespermanĝo.



La vesperon plenigis dancvespero en la manĝejo kun unu kantisto kaj lia elektronika muzikilo scianta imiti orkestron.

Necesas menciigi, ke dum la tuta kongreso funkciis ankaŭ libroservo kaj en manĝejo malgranda bufedo, kie oni povis aĉeti kafon, vinon kaj kukojn.

La dimanĉan antaŭtagmezon komencis Miroslav Malovec per priskribo de iamaj asociaj ekzamenoj, kiuj nun estas anstataŭigitaj per KER-ekzamenoj. Andrea Švubová rakontis pri IFEF-kongreso en Beroun. Poste oni diskutis pri diversaj propagandaj aferoj kaj akceptis rezolucion.

-mm-

Usnesení sjezdu Českého esperantského svazu, z. s., který se uskutečnil v Pardubicích ve dnech 16. - 18. září 2022

Sjezd zvolil:

1. členy Výboru ČES pro volební období 2022-2025 ve složení: Jiří Tomeček – předseda a statutární orgán, Libuše Hýblová – místopředsedkyně, Leonarda Chaloupková – členka, Andrea Švubová – členka a pokladník, Miroslav Malovec – člen a šéfredaktor Starta, Josef Kalčík – člen.

Sjezd schválil:

1. zprávu o činnosti ČES za období listopad 2019 až srpen 2022,
2. zprávu o hospodaření za období listopad 2019 až srpen 2022,
3. udělení čestného členství ČES Mgr. Janě Melichárkové.

Sjezd doporučuje:

1. všem členům ČES propagovat Muzeum esperanta ve Svitavách a podporovat jeho činnost,
2. všem členům a klubům věnovat se studiu (opakování) esperanta a využívat možností jazykových esperantských kurzů a škol, které jsou pořádány v ČR i v zahraničí.

Sjezd vyzývá:

1. všechny členy a organizační složky spolupracovat s Výborem ČES na přípravách podání návrhu na zařazení esperanta jako nemateriálního kulturního dědictví ČR,
2. členy k větší aktivitě, k přispívání do Starta a na webové stránky ČES.

Sjezd ukládá:

1. výboru ČES zjistit podmínky a možnosti pro pořádání UK 2026 v České republice.

V Pardubicích 18. 9. 2022

Nia kongresa filmo



Jana Melichárková Nova honora membro de ĈEA



Jana Melichárková naskiĝis la 3-an de aŭgusto 1958. Prezidantino de ĉeĥa sekcio de ILEI ekde 1998, en 2005 elektita kiel **prezidantino de ĈEA** ĝis 2011. Ŝi malfermis nian muzeon en Svitavy.

Profesie magistrino de pedagogio, ŝi instruis en elementa lernejo de Ratiškovice, kie ŝi dum pluraj jaroj gvidis Esperanto-rondeton de infanoj.

Ŝia laboro kun infanoj inspiris ŝin elabori novajn lernolibrojn por infanoj Esperanto 1 kaj Esperanto 2, kiujn ilustris Miroslava Tomečková kaj eldonis KAVA-PECH. Fabelojn tradukis Miroslav Malovec. La lernolibro aperis ankaŭ en pola traduko.

Ŝia filo Petr Melichárek prilaboris interesan interretan ekzercaron al lernolibro *Esperantem za tři měsíce* (Esperante paroli post trimonata lernado), kiun verkis Petr Chrdle kaj Stanislava Chrdlová (Ekzercaro por la lernolibro)

Verkoj de Jana Melichárková

Esperanto por infanoj 1 (Kava-Pech, 2003, 70 p.)

Esperanto dla dzieci (Pola eldono)

Esperanto por infanoj 2 (Kava-Pech, 2006, 101 p.)



Ekspozicio en Dolní Kounice

La 2-an de oktobro 2022 en kastelo de Dolní Kounice estis inaŭgurita ekspozicio de moderna vid-artista grupo, al kiu apartenas ankaŭ Gabriela Kopcová, aŭtorino de modernaj pentraĵoj kaj de pluraj infanlibroj, inter ili *Vesmírníčky*, aperintaj ankaŭ en Esperanto kiel *Kosmofabeloj*. Ŝiaj libroj estis ekspoziciitaj sur tablo kaj la Esperanto-version unu sinjoro eĉ aĉetis.

La kaduka kastelo nun apartenas al privatulo, kiu diris al ni, ke en la tempo de ĝia konstruado ĉeĥoj estis la tria plej granda nacio en Eŭropo.



Ĉeĥaj esperantistaj fervojistoj

7 - 9 oktobro 2022 Prudká

En la ripozejo Prudká apud Tišnov okazis jarkunveno kaj konferenco de ĉeĥaj esperantistoj-fervojistoj. En la ripozejo staras ĉefa konstruaĵo kun saloneto, kuirejo kaj manĝejo kaj dormoĉambroj en la supra etaĝo, ĉirkaŭ la konstruaĵo troviĝas pluraj kabanoj, ludejoj por infanoj kaj sportejoj. Ĝuste tie estis kelkaj infanaj grupoj, kiuj sportis en kurado kaj pafado. Sabate ili forveturis.

Dudeko da partoprenantoj aŭskultis prelegojn, rememoris aprilan IFEF-kongreson en Beroun, ludis tabloludojn.

Sabate posttagmeze alveturis Marek Blahuš kun siaj du filinetoj (kun kiuj li interparolas nur Esperante), ĉar ili loĝas proksime.

La aranĝon prizorgis ĉefe Anna Abelovská, Ladislav Hakl kaj Andrea Švubová. Partoprenis ankaŭ fervojisto el Francio.



Universala Kongreso

Torino 29.07.-05.08.2023

Zvažujeme autobusový zájezd na UKo do Turína v roce 2023. Zájemci pište na adresu tomecek@esperanto.cz.

La Kongresa Fako

**Nova maniero organizi
la Universalajn Kongresojn**

La kongresojn ne plu organizos Lokaj Kongresaj Komitatoj (LKK), sed speciala teamo E@I: Peter Baláž, Dotoro Rodzianko, Matthieu Desplantes, Sonja Zaretskaja, Darina Slonova kaj Edoardo Nannotti.

Přímí členové UEA

**Výše členského příspěvku pro rok
2023**

**Kategorio MB (baza, kun reta gazeto
Esperanto) EUR 27.- (680 Kč)**

**Kategorio MA (kun papera Revuo
Esperanto) EUR 57.- (1440 Kč)**

**Kotizo por Societo Zamenhof
(Kategorio SZ, mecenato de UEA), la
kotizon oni pagu aldone al sia
kategorio de membreco EUR 114.-
(2880 Kč)**

**Patrono de TEJO (Kategorio PT,
mecenato de TEJO) ne inkluzivas
membrecon. PT ricevas la junularan
revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn
de TEJO) EUR 44.- (1110 Kč)**

Přímí členové UEA kat. MB a MA do 29 let včetně dostávají navíc oficiální orgán TEJO „Kontakto“.

**Výše v Kč uvedená v závorce platí jen
při platbě do 22. 12. 2022.**

Tago de Lingvoj ĉe Gimnazio Svitavy

La 26-an de septembro oni festas la Tagon de Eŭropaj Lingvoj. Ĉar la komenco de la lernojaro, laŭ la lernejestro Milan Báča, estas ĉiam ekscita, Gimnazio Svitavy okazigis la Tagon de Lingvoj la 11-an de oktobro. La kvarhora programo efektiviĝis en kvar grupoj.



Libuše Dvořáková el Esperanto-Muzeo prezentis al la studentoj la lingvon Esperanto kaj ĝian kreinton L. L. Zamenhof, plue simplan gramatikon de Esperanto, eblojn de utiligo en diversaj organizoj, kongresoj, seminarioj kaj renkontiĝoj. Sonis Esperanto kantata (Kristnaskaj kantoj, arioj el Najado en interpreto de Vanda Šířová) kaj Esperanto parolata de etaj infanoj el Bartošovice en mallonga filmo „Patrino“. La gestudentoj estis ankaŭ invitataj al opero Sternenhoch, kiun Nacia Teatro Praha donas jam kelkajn sezonojn. Ili miris pro sukcesoj de la teatra ensemblo DOMA sub gvido de Radka Oblouková, kiu jam prezentis sin en universalaj kongresoj de Esperanto en Suda Koreio,

Islando kaj Slovakio. Fine de la prezento la studentoj elprovis sian memoron en mallonga kvizo. Membrino de Esperanto-klubo Svitavy Li Huang prezentis sian nakiĝlandon, Ĉinion, inkluzive de tea ceremonio. Sinjoro Richardson Manzol prezentis Venezuelon, kie li naskiĝis. La kvara grupo praktikis kvizon pri Edinburgo kaj enigmojn.

Libuše Dvořáková

Novaj libroj



Oldřich Arnošt Fischer eldonis novan libron de sia serio pri la naturo, ĉi-foje el vegetaĵa regno **Arboj kaj arbedoj**.

Mendoj: olda.morav@seznam.cz

Jindřiška Drahotová eldonis unu el siaj tradukoj el Esperanto en la ĉeĥan, libron de rakontoj de Cezaro Rosetti *Kredu min, sinjorino*, ĉeĥlingve **No fakt, paní, věřte mi**. Mendoj:

drahotovaesperanto@seznam.cz

La libro estis lanĉita solene, vidu ĉe:

<https://www.mb-net.cz/drahotova-prelozila-vtipnou-knihu-o-prodejcich-rncu/d-79101>

Inaŭguro de nova ekspozicio en Svitavy

21 - 23 oktobro 2022

La programo de la renkontiĝo estis riĉa. Vendrede vespere la studenta grupo DOMA prezentis denove la teatraĵon Ludoj kun diablo, kiun ili ludis jam en Pardubice.

Sabate matene estis inaŭgurita nova ekspozicio **Fakaj Asocioj de UEA** kun malgranda bufedo kaj komuna tosto.

Libuše Dvořáková prelegis pri F. V. Lorenz, kiu naskiĝis antaŭ 150 jaroj. Petr Chrdle kaj Peter Baláž poste prezentis novajn librojn de siaj eldonejoj.



Mária Pilková rakontis pri sia ekskurso al Madagaskaro.



Dimanĉe Petr Chrdle memorigis la biografion de Eli Urbanová, kiu naskiĝis antaŭ 100 jaroj, Mária Pilková deklamis kelkajn poemojn kaj Libuše Dvořáková prezentis la agadon de esperantista klubo en Svitavy en la jaroj 2020-2022.

Funkciis ankaŭ libroservo kun novaj libroj de ambaŭ Petroj.

mm

fotoj A. O. Fischer

Posttagmeze Ladislav Hakl prelegis pri IFEF-kongreso en Beroun, Petr Chrdle prezentis seminariojn AEST ĝis la jaro 2008, ĝis kiam li organizis ilin en Dobřichovice, poste la prelegon daŭrigis Peter Baláž, kiu aranĝas ilin en Slovakio.

Kiel gasto parolis neesperantisto Lubomír Tomik, kiu post grava akcidento preskaŭ ĉesis paŝi, nun helpas al aliaj handikapitoj kaj verkas poezion.

Post vespermanĝo Peter Baláž omaĝis al Jano Vajs, kiu forpasis antaŭ unu jaro, per prelegoj pri aranĝoj en Poludnica, kies ĉefa organizanto estis ĝuste Jano Vajs.



Esperanto jako české kulturní dědictví

Esperantské hnutí obohatilo i českou kulturu, což si často neuvědomují ani sami esperantisté.

■ Nevidomý hudební skladatel a esperantista **Karel Emanuel Macan** (1858-1925) založil **Macanovu knihovnu pro nevidomé**, která je dodnes příjemcem povinných výtisků slepecké literatury a má i esperantské oddělení.

■ Symbolem holokaustu, podobně jako Anne Franková, je český chlapec židovského původu **Petr Ginz** (1928-1944), jehož otec Ota Ginz (1896-1976) byl významným překladatelem do esperanta a se švagrem Ottou Sklenčkou (1891-1962), otcem herce Oty Sklenčky (1919-1993), patřili k vůdčím osobnostem českého esperantského hnutí.

■ Čeští esperantisté měli významný podíl na založení a rozvoji české **Wikipedie**.

■ Novou úspěšnou českou operu **Sternenhoch** skladatele Ivana Achera hraje Národní divadlo v esperantu

■ K průkopníkům českého esperantského hnutí patřili **F. V. Lorenz** (1872-1956), jehož jméno nese knihovna ve Vrdech, učitel **Theodor Čejka** (1878-1957), zakladatel českého esperantského hnutí a otec jazykovědce **Mirka Čejky** (1929-2017), významný kmenolog **Josef Krumpholtz** (1870-1950), novinář **Karel Pelant** (1874-1925), přítel Haškův a Macharův, chemik **Alexandr Sommer Batěk** (1874-1944), spoluvůdce českého chemického názvosloví.

■ Řada děl české literatury je ve světě známá také díky esperantským překladům: **Máj**, **Křest sv. Vladimíra**, **Král Lávra**, **Kytice**, **Babička**, **Noc na Karlštejně**, **Prodaná nevěsta**, **Rusalka**,

V studni, **Jakobín**, **Lelíček**, **Švejk**, **R.U.R.**, **Válka s mloky**, **Slezské písně**, **Vlastní životopis Karla IV.**, **Třicet let na zlatém severu**, stovky básní a povídek. O překlady do jiných jazyků se starají příslušné národy, ale o překlady do esperanta musí každý národ pečovat sám, tedy o překlady z češtiny český národ.

■ Rozhlasová **Zelená stanice** propagovala československou kulturu před druhou světovou válkou (Brno) i po ní (Praha), s přednáškami i uměleckými hodinkami (*Polská krev*, *Na různých ustláno*, *R.U.R.*, *Prodaná nevěsta*, *V studni*, *Rusalka*, *Bílá nemoc*). Řada textů se dochovala, nejcennější je zvuková nahrávka **Rusalky** s Marií Tauberovou, Beno Blachutem a Karlem Kalačem, komentář čte Karel Höger.

■ Někteří čeští básníci a spisovatelé **psali v esperantu** (např. Stanislav Schulhof, Ladislav Riedl, František Omelka, Karel Píč, Stanislav Bubeníček, Štefo Urban, Eli Urbanová, Josef Rumler, Jiří Karen, Jiří Kořínek). Odbornou literaturu Josef Kavka, Jan Werner, Zdeněk Pluhař, Věra Barandovská-Frank.

■ Nakladatelství KAVA-PECH, vydávající literaturu hlavně v češtině a esperantu, překlady do i z esperanta, je držitelem **certifikátu o rekordu** při vývozu knih do největšího počtu zemí (Muzeum rekordů Pelhřimov).

■ Stejně ocenění získal i esperantista Viktor Dvořák, který pro vydání Březinových básní *Tajemství bolesti - Mistero de doloro* v češtině, esperantu a dalších jazycích **objevil nejvíce cizojazyčných překladů** tohoto básníka (překlad do esperanta T. Pumpr a J. Kořínek).

■ Překladatel *Křestu sv. Vladimíra*, JUDr. Tomáš Pumpr, vysvětlil dobové politické narážky, které Havlíček použil a které až do esperantského překladu nebyly vysvětleny (např. kacik v Hessen-Kasslu = kurfiřt Vilém II, známý milostnými skandály).

■ Některá díla české literatury byla přeložena do čínštiny, japonštiny, finštiny, malštiny apod. prostřednictvím esperanta nebo s pomocí českých esperantistů, kteří vysvětlili nesnadná místa (Hašek, Čapek, Drda, Bezruč). Jiná díla byla naopak přeložena do češtiny.

■ Ve Svitavách je Muzeum esperanta s knihovnou (20 tisíc položek) a tematickými výstavami, sbírku esperantských knih má i Městské muzeum v České Třebové (6 tisíc titulů).

Nova aranĝo por infanoj en Esperanto-Muzeo

Dum la 1-a adventa dimanĉo la 27-an de novembro 2022 okazigis la esperantista klubo en Svitavy novan aranĝon por infanoj. Kunlabore kun Eva Karbašová efektiviĝis kreado de Kristnaskaj bondeziroj kaj etaj anĝeloj.



Komence ni timis, ke venos malmultaj

vizitantoj. Tial ni igis presi afiŝojn kaj glui ilin tra la urbo. Atentigo aperis ankaŭ en la urba monata gazeto *Naŝe město* (Nia urbo).



Jam ekde la 9-a horo komencis venadi etaj infanoj kaj kun intereso kreis bondeziraĵojn por siaj panjoj kaj avinjoj. Elektro estis granda kaj la fantazio de la infanoj disvolviĝis. Jam nun ili ĝojas pri plia kreado, ĉar post semajno ili povos labori per marcipano.



Libuše Dvořáková



120 jaroj de Esperantista klubo en Prago

11 - 13 novembro 2022

Vendrede la 11-an de novembro 2022 vespere la festado de la klubo komenciĝis en la Centro Elpida en kvartalo Holešovice.



Venis ĉirkaŭ dudek personoj, kiujn atendis tablo plena de manĝoj, prelegoj *Novajoj de KAVA-PECH* kaj *E-mental en Italio* kaj komuna kantado kun Pavla Dvořáková, kiun akompanis Josef Kalčík (ambaŭ ludis ukulelojn).



Vlasta Pišítková zorgis, ke neniu malsatu.



Sabate la 12-an de novembro 2022 ĉiuj kolektiĝis en la klubejo de la Esperantista Klubo en Prago (EKP) en la strato *Ve Smečkách*. Alvenis pli multaj personoj, ankaŭ gastoj eksterlandaj, nome Irek Bobrzak el Pollando, Alfred Heiligenbrunner el Aŭstrio kaj slovaka lingvisto Stano Košecký.



Post mallonga salutparolo de la kluba prezidanto Tomáš Břicháček komenciĝis promeno tra Prago, kies celo estis viziti la lokojn iel gravajn por la Esperantomovado en Prago kaj Ĉeĥio.

Jam en la sama strato troviĝas Macanbiblioteko por nevidantoj kaj en la kontraŭa domo de Teatra Klubo estis iam Virina Esperanto-Rondeto.

Nia unua halto estis ĉe iama gastejo U Štajgrů, kie la praga klubo estis fondita (nun tie staras domo U Nováků). Poste ni vidis lokon, kie Lorenc havis unuan (ne tre sukcesan) kurson, oficejan domon, kiu staras sur loko de iama kafejo Union, sur kies angulmuro estis ŝildo Bohema Unio Esperantista, kompreneble ankaŭ Slavan insulon kun Palaco Žofín (kongresejo de la 13-a Universala Kongreso en 1921), iaman sidejon de ĈEA en la strato Jilská kaj post angulo klubejon en la strato Vejvodova.

Interesa estis domo en la strato Benediktská, sur kies flanka muro konserviĝis surskribo *Jaroslav Šustr Lahůdky* kun granda verda stelo (kaj ankaŭ kun paliĝinta germana traduko).

Kiam ni sukcesis ne perdiĝi en la homplena Malnovurba Placo antaŭ la astronomia horloĝo, ni forveturis per metroo al kvartaleto Podskalí sub Vyšehrad, kie la kafejo AdAstra estis rezervita sole por ni.



Post tagmanĝo laŭ sveda maniero (ĉiu mem priservis sin) sekvis prelegoj: *Fondo de la Esperantista klubo en Prago* (Tomáš Břicháček), *Aŭskultu, ĝuu kaj komprenu* (Irek Bobrzak, redaktoro de la retejo Varsovia Vento), *Imunsistemo kaj vakcinado* (Alfred Heiligenbrunner, Aŭstrio) kaj *Eli Urbanová* (Petr Chrdle). Estis prezentitaj trovitaj malnovaj klubaj filmetoj (ekz. pri vojaĝo al Balkano) kaj kiel surprizo Cimrman-filmo *Murdo en salonkupeo* kun esperantlingvaj subtekstoj.



Meze de la filmo venis alia surprizo, operkantistino Vanda Šípková, kiun

invitis Pavol Kaščák. Ŝi diris, ke Esperanto estas bone kantebla lingvo kaj kantis komencon el la opero *Sternenhoch*.




Tria surprizo estis ciferoj 120 kunmetitaj el korboformaj kuketoj kun pudingo. Ĉiuj esperantistoj kolektiĝis ĉe la tablo, tostis, fotis kaj la kuketojn formangiĝis.



En la bloko „oficialaĵoj“ estis legita salutletero de la prezidento Miloš Zeman kaj kluban diplomon (dankesprimon) ricevis kvin pli frue naskitaj merituloj, nome Margit Turková, Libuše Dvořáková, Viktor Dvořák, Jindřich Košťálek kaj Petr Chrdle.

Post vespermanĝo oni ankoraŭ babilis kaj iomete komune kantis.




Gastoj Alfred kaj Irek prelegas



Dimanĉe je la 10-a horo ni alvenis al Kongresa Centro en Vyšehrad, kie en 1996 okazis la 81-a UK. Ekde tiu tempo staras tie ankaŭ Esperanto-ŝtono (danke al s-ino Helena Maudrová), tie ni fotis nin kaj poste promenis malrapide al la tombejo de Vyšehrad, kie kuŝas esperantisto Karel Emanuel Macan, nevidanta muzikisto, kiu fondis bibliotekon por nevidantoj kaj okazigis kunvenon de blindaj esperantistoj dum UK 1921. Kaj estas tie multaj neesperantistaj famuloj (B. Němcová, J. Neruda, V. Nezval, Vl. Burian, W. Matuška, R. Brzobohatý k.a.).



De tie ni celis al restoracio *V Podskali* (En Subrokejo), kie oni havas menuon ankaŭ en Esperanto (danke al E-mental). Per la tagmanĝo la festo finiĝis.



La klubo eldonis broŝuron, en kiu troviĝas ankaŭ salutoj. La plej gravan ni prezentas en traduko:

Estimataj kaj karaj amikoj de Esperanto, mi kore salutas vin okaze de la 120-a datreveno de fondo de via klubo. La internacia lingvo Esperanto gvidas min al mallonga pripensoj. La mondo, kiel ni povas nuntempe observi, dividiĝas kaj estiĝas novaj fosaĵoj kaj novaj malamikoj. Esperanto, ĝia misio, iras alian direkton. Ĝi prezentas komunan denominatoron de la homaro, elementon, kiu iras kontraŭ divido kaj malpaco. Jes, ĝi estas nobla ideo, kiu devus inspiri. Mi deziras al vi ĉion bonan, por ke vi plu disvastigu la pozitivan celadon de la internacia lingvo Esperanto.

*Miloš Zeman,
prezidento de la respubliko*

Hledáme některá čísla pražského bultena

Při sbírání informací k dějinám pražského klubu esperantistů se ukázalo, že některá čísla bultena nejsou ani v našem svitavském muzeu. Pokud někdo doma nebo v klubovně tato čísla máte, budeme vděční aspoň za skeny, které prosím pošlete redaktorovi Starta, který má na starost i Paměť našeho hnutí.

Konkrétně chybí roky 1965-1968, poslední číslo 1969, první číslo 1973, poslední čísla roků 1974 a 1975, roky 1976-1985, číslo 2/1987, roky 1989-1990, čísla 3/1991 a 3/1992, rok 1993.

Děkujeme za pomoc.

Miroslav Malovec
malovec@volny.cz

Olgoj ĥorĥoj

mita vermo, aŭ la mistero de la sabla monstro,
kiu mortigas vivajn estaĵojn



Neniu alia estaĵo terurigas multajn aziajn paŝtistojn tiom, kiom io, kio neniam estis vidita, ne estis priskribita detale de sciencistoj kaj kiu havas multajn neantojn.

Olgoj chorchoj – Olgoj ĥorĥoj, vermo kiu laŭdire aspektas pli kiel peco de dika besta intesto plenigita per homa sango. Ĝia teritorio estas la azia dezerto Gobi.

Laŭ la disponeblaj atestoj, ĝi estas malhelruĝa kun brunaj makuloj. Sed kie estas ĝia kapo kaj kie estas la alia parto de ĝia korpo, oni diras, ke ne plu eblas diri.

Tre malmulte estas konate pri ĝia vivo, ĉar ĝi pasigas la plej grandan parton de sia tempo entombiĝinta en la sablo kaj venas al la surfaco nur en kazoj ankoraŭ ne specifitaj. Ĉi tio ankaŭ kontribuas al tio, ke ĝi elvokas tian panikan hororon.

Olgoj ĥorĥoj (olgoj = intesto, ĥorĥoj = vermo) estas mita sablovermo, kies aspekto ofte troviĝas en la suda parto de la azia Gobia dezerto. Tamen, la ekzisto de ĉi tiu estaĵo ankoraŭ ne estis pruvita.

La mongoloj timis la estaĵon dum pluraj jarcentoj. Tamen malmultaj, se iuj, vidis ĝin per siaj propraj okuloj. La okcidenta mondo eksciis pri ĝi nur en 1926 danke al la libro „In the Footsteps of the Ancient Man“ (Sur la paŝoj de antikva homo) de la usona naturisto, aventuristo kaj vojaĝanto Roy Chapman Andrews (1884-1960). Rusa/soveta paleontologo kaj verkisto Ivan Antonoviĉ Jefremov (1908-1972) ankaŭ skribis imponan kaj timindukan novelon pri ĝi en 1944. Ekde tiam, kriptozoologoj kaj aliaj entuziasmoj traktantaj misterojn aŭ eksterteran vivon komencis serĉi la „murdinton“.

✱

Ĉi tiu timata kaj mita sablovermo teruras paŝtistojn kaj loĝantojn de la plej suda parto de la azia dezerto Gobi ekde antikvaj tempoj. Ĝi estas konsiderata la reprezentanto de la diablo sur la tero. Olgoj ĥorĥoj, mita estaĵo loĝanta en la Gobi-dezerto, estas ĉirkaŭita de teruraj legendoj. Preskaŭ ĉiuj, kiuj renkontas ĝin, mortas en ili. Tuj kiam la sablo ondetas nur iomete, eble nur pro ventoblovo, ĉiuj rapide forkuras. Se estis Olgoj ĥorĥoj, ni eskapis certan morton, oni diras unu al la alia en la rifuĝejo. Malgraŭ tio, ke neniu krom la lokuloj iam vidis ĝin, kaj la scienca mondo havas neniujn palpeblajn pruvojn pri ĝi, ĝi inspiras timon kaj teruron, sufiĉas nur ekpensi pri ĝi. Multaj ekspedicioj provis klarigi tiun ĉi lokan misteron, sed ĝis nun sen sukceso. Kaj tiel ĝi restas dum jarcentoj nur en legendoj, kiuj estas transdonitaj de generacio al generacio.

Renkontoj kaj serĉoj

Kvankam ekzistas pluraj ĉeestintoj kaj multaj legendoj pri tiu dezertvermo, ĝia ekzisto daŭre estas tre dubinda. Neniu el la sciencistoj iam vidis ĉi tiun mitan estaĵon, sed kredo je ĝi estas forta ĉe mongoloj. Iuj estas konvinkitaj, ke ĝi ne estas besto, sed supernatura estaĵo, do ili timas eĉ diri ĝian nomon. Oni diras, ke la atestoj estas preskaŭ identaj, do la ebleco de ekzistado ne povas esti tute neita. Supoze, estas konataj situacioj kie paŝtistoj rakontas pri sia renkontiĝo kun olgoj. Unu tia rakonto priskribas viron, kiu iam eniris jurton kaj vidis olgojn kuŝantan sur la tero, do li rapide kaptis ŝtalan tekaldronon troveblan en plej multaj jurtoj, kovris la olgojn per ĝi kaj rapide trenis la olgojn eksteren al la antaŭo de la jurto.

Tamen, la kaldrono preskaŭ tuj flaviĝis kaj montris signojn de acidakva forto. Ja, oni diras, ke ĉiuj aferoj, kiuj eniras rektan kontakton kun olgojo, flaviĝas pro la ago de forta veneno, kiu verŝajne estas de tia konsisto, ke ĝi eĉ povas korodi metalon. Pro tiu fenomeno, multaj tekstoj pri olgojo montras informojn, ke ĝi estas allogata de la flava koloro, sed tio estas nur supozo.

Priskribo

Kelkaj zoologoj opinias, ke ĝi povus esti unu el la specioj el la familio de „skinkoj“ - kelkaj el ili malmulte similas al reptilioj, ekzemple la aŭstralia skinko, kies kapo kaj vosto apenaŭ estas distingeblaj de la korpo. Tamen, skinkoj senescepte havas kruojn, dum ĉiuj signoj de olgojo montras al senmembra korpo. Ĝi ofte estas priskribita kiel glata

besto simila al trokreskinta lumbriko aŭ dika intesto plenigita de sango. Ĝi laŭdire atingas longon de 0,5 ĝis 1,5 m. Kelkaj ankaŭ uzas la esprimon "salamkonuso" por priskribi ĝian aspekton. Ĝi devus aperi nur en junio kaj julio, la plej varma tempo de la jaro, kiam ĝi enfosas sin en la sablon aŭ rampas en truojn. Moviĝante, ĝi ne rampas antaŭen, sed ruliĝas flanken kvazaŭ balaante, lasante karakterizan spuron.

Ĝi laŭdire ŝatas loĝi sur cigarforma planto konata kiel gojo (legu: goĝo), kiu estas tre venena. Mi ne trovis ajnan klarigon por tiu ĉi vorto en la reto. Bonvolu ne konfuzi kun la planto goji (legu: goĝi). Mongolaj paŝtistoj estas tiel konvinkitaj pri la ekzisto de olgoj ĥorĥoj, ke ili eĉ timas diri ĝian nomon, por ke ili ne hazarde alvoku ĝin.

La plej granda kialo por timo estas, ke ĝi estas murdinto. Laŭ kelkaj versioj, ĝi mortigas vivantan estaĵon je distanco de ĝis ses metroj. Kiel? Unu versio asertas ke la olgoj uzas la elektron, kiun ĝi generas en sia korpo por ataki, tiam uzas la senŝargiĝon por frapi sian celon. La dua versio konsistas en tio, ke la olgoj havas sur sia korpo sakon, aŭ pli ĝuste bobelon, kiun, se necese, ĝi plenigas per veneno, kiun ĝi kreas uzante la komponantojn de sia manĝaĵo, kaj rapide malplenigas vezikon plenan de veneno. Ĝi eksplodas kaj ŝprucas venenon al la celo. La konsisto de la veneno supozeble estas sufiĉe forta por mortigi plenkreskan personon post kelkaj sekundoj da haŭtokontakto. Ĉi tio signifas, ke la veneno fermos viajn pulmojn, koron kaj cerbone de sekundoj. Ĉar tiumomente ne estas helpo por vi pro la ekstrema tokseco – eĉ se vi jam kuŝis en intenskuraĵo kun pintaj teamo kaj ekipaĵo.

Ĉe atako ĝia rozkolora koloro fariĝas ruĝa, ĝia antaŭa parto de la korpo altiĝas, kaj la tuto fariĝas tre malhela. Ĝi laŭdire povas mortigi ne nur homon sed ankaŭ grandan hundon aŭ kamelon per nerimarkita maniero.

Eĉ la Gobia dezerto mem, kie loĝas olgoj ĥorĥoj laŭ diversaj nekonfirmitaj atestoj, ne estas tre bonveniga loko. Ĝi estas unu el la plej malnovaj kaj plej grandaj dezertoj en la mondo. Ĝi estas disvastigita tra norda Ĉinio kaj suda Mongolio. Ĝi estas unu el la plej malvarmaj dezertoj, kie temperaturoj povas varii de $-40\text{ }^{\circ}\text{C}$ vintre ĝis $+40\text{ }^{\circ}\text{C}$ somere. Averaĝa pluvokvanto ne superas 76 mm da akvo jare, igante la dezerton unu el la plej sekaj regionoj en la mondo.

Ĉi tio estas reflektita en ĝia loĝantaro, kies kvanto estas inter la plej malaltaj en la mondo. Granda kaj sufiĉe malmulte konata interesa fakto estas, ke en 1990 la ĉeĥo Inĝ. Ivan Mackerle (1942-2013) – ĵurnalisto kaj enigmisto – serĉis la vermon.

Ankaŭ la faka rusa retejo **journalist-nsk** atentigis pri lia laboro. Ivan Mackerle starigis fotilkaptilojn kaj metis ŝargojn en la sablon. Post olgoj, tamen, la tero ŝajnas esti kolapsinta. Eĉ la elektromagnetaj pulsoj ne identigis ĝin. Sed dum la laboro, la teamo trovis solecan jurton loĝitan fare de loka ŝamano. "Li konsilis al ni, forlasi la serĉon, aŭ ni sendos malbenon sur nin mem," diris la esploristo. Do ili revenis al la tendo tiutage. Ivan Mackerle laŭdire konfirmis kelkajn supozojn de la lokaj paŝtistoj. Ekzemple, la franca retejo **observe.france24** atentigis pri pluaj esploroj, kiam ĝi raportis la rezultojn de la brita sciencisto Richard Freeman: „La vermo

certe ekzistas. Kiam ni parolis kun homoj dum nia vojaĝo en Mongolio, ili ĉiuj estis tute certaj pri tio. Neniu konas iun, kiu estis mortigita de vermo, sed estas multaj, kiuj asertas, ke ili vidis ĝin. Ili parolas pri infano, kiu pikis vermon per bastono. Sed ĝi estas nur rakonto. Mi pensas, ke ĝi estas reptilio. Ĝi estas aŭ nekonata specio de vermlacerto (rilata al serpentoj) aŭ nekonata specio de sabloboao*. Neniu konsideras ĝin mita estaĵo en Mongolio, sed vera vivanta besto.”

Alia rakonto rakontita: Knabo sidis ekster kabano, serĉante siajn gepatrojn, kiuj iris butikumi. La posttagmezo trenis sin neelteneble. Tamen, li baldaŭ laciĝis observi de malproksime. Li decidis ludi per la koloraj ŝtonoj, kiujn li kaŝis en la skatolo sub la lito. Dum li provis eltiri ĝin, li rimarkis, ke apud ĝi kuŝas io ruĝa, simila al viando.

Do, kio?!

**Ni apartenas al la nacioj, kiuj havas
lupon, kiu manĝas avinojn
kaj sepkapan drakon,
sed estas vere, ke la eŭropa baseno ja
ne estas Mongolio.**



*Kompilis helpe de la retaj informoj kaj
esperantigis Josef Kříž, Ĉeĥa respubliko
Bildoj el Vikipedio*

**boao = hroznyš*

Mezinárodní zkoušky z esperanta

Milan Kolka

Český esperantský svaz měl svoje vlastní svazové zkoušky. Zkoušelo se nejen ze znalosti esperanta, ale i ze znalostí esperantské kultury. Ti, co chtěli esperanto učit, skládali i zkoušku z pedagogiky. Řada starších českých esperantistů se dodnes může pyšnit osvědčením o znalosti esperanta.

Výhodou svazových zkoušek bylo, že se jedná o komplexní zkoušku zaměřenou nejen na jazyk. Nevýhodou je, že se jednalo o zkoušku svazovou, uznávanou jen uvnitř svazu.

Od roku 2001 je v Evropské unii zaveden Společný evropský referenční rámec pro jazyky. Ten rozděluje znalost cizího jazyka do tří kategorií, z nichž každá má dvě podkategorie. Pro každou úroveň je určeno, jaké jazykové schopnosti se očekávají.

Na úrovni A1 to jsou začátečníci, kteří dokážou pozdravit, poděkovat a vyplnit formulář v hotelu, nejvyšší úroveň C2 už je pro profesionální použití, kde uchazeč musí být schopen používat jazyk bez slovníku na odborné úrovni a zná i idiomy. Znalost jazyka dostatečná k dorozumění v běžných situacích je B1–B2.

Zkoušky jsou pro řadu jazyků, nejen pro ty „světové“. Například existují takové zkoušky i z češtiny (A2 je podmínkou pro získání trvalého pobytu, B1 je podmínkou, nikoliv však jedinou, pro udělení občanství). Nejvyšší úroveň zkoušky z češtiny je C1.

Mnozí známe podobné zkoušky z cizích jazyků, zejména pak angličtiny.

Díky ILEI a UEA a zejména díky

iniciativě Katalin Kovacs od roku 2008 je možno složit zkoušku podle Společného referenčního rámce též z esperanta. Zkouška se označuje KER ekzameno (KER je zkratka z Komuna Eŭropa Referenckadro). Zkouška byla vytvořena ve třech úrovních: B1, B2 a C1. Dosud (k 1. říjnu 2022) zkoušku úspěšně složilo 2559 lidí z 81 zemí. Mezi nimi je i 13 esperantistů z Česka, z nichž 2 mají B1, 5 složilo B2 a 6 složilo C1). Ve Francii zkoušku už složilo 570 osob. Když to přepočteme na počet obyvatel, tak ve Francii má zkoušku KER 12krát více lidí než v Česku.

Zkouška má dvě části – písemnou a ústní. Lze skládat zvlášť nebo dohromady, pak se jedná o kompletní zkoušku.

Písemná část probíhá v kuse bez přerušení. Délka je závislá na úrovni. U B1 je vyhrazený čas 2 hodiny, u B2 tři hodiny a u C1 čtyři hodiny, u C2 3,5 hodiny. V písemná část se skládá z gramatických testů (doplňování do textu, výběr správné varianty), vlastního písemného projevu (např. máte napsat dopis) a ověření porozumění textu (zákeřné otázky, zda něco vyplývá z textu, samozřejmě formulované jinak). Ověřuje se znalost gramatiky a slovní zásoby.

Ústní část je zaměřena na poslech a na vlastní mluvení. V poslechové části uslyšíte dvakrát audionahrávku a odpovídáte na otázky podle ní. Musíte poslouchat pozorně, protože v otázkách mohou být zákeřnosti (např. klíčové slovo z otázky v nahrávce zazní, ale v jiném kontextu, než je otázka).

Mluvení probíhá formou rozhovoru se zkušebním komisařem. Nejprve se mu představíte a řeknete něco o sobě. Pak dostanete obrázek, který máte popsat. Nejen „tady je koš ovoce a tady je paní“, ale trochu to rozvést (například „Vidím paní, nese velký koš s ovocem. Asi nese úrodu na trh...“). Poslední částí je simulovaný rozhovor z nějaké situace. Například reklamace zavazadla na letišti.

Všechny části zkoušky jsou bodovány. Pro úspěšné zvládnutí části je potřeba získat alespoň 60 procent z maximálního počtu bodů.

Zkouška na úrovni C2 se od uvedeného trochu liší. V písemné části se píše esej, článek, recenze na dané téma, v ústní části kromě uvedeného si zkoušený připraví přednášku na dané téma (má 20 minut na přípravu).

Letošní ceny zkoušek (úplných) letos pro uchazeče z Česka jsou: B1 – 40 €, B2 – 42 €, C1 – 48 €, C2 – 64 €. Pro srovnání, zkouška FCE (angličtina na úrovni B2) u British Council letos stojí 4950 Kč.

Zkoušky probíhají několikrát ročně na různých místech na světě, většinou na velkých esperantských akcích. Od doby covidu probíhají zkoušky i on-line. V roce 2022 proběhly dvě vlny zkoušení. V červnu byly zkoušky on-line, v srpnu pak fyzicky na Světovém kongresu v Montrealu. V listopadu proběhnou tzv. Celosvětové zkoušky. Celosvětové zkoušky probíhají ve stejný den na různých místech na světě, pokud organizátoři dokázali sehnat dostatečný počet zájemců. Pavol Kašćák chtěl letos udělat zkušební místo v Bartošovicích, bohužel se nenašlo dost odvážlivců.

On-line zkoušky probíhají doma ve speciálním režimu. Musíte mít zapnutou

kameru a v počítači program Proctor, který hlídá, abyste nedělali něco zakázaného. Nečekejte tedy, že si to ulehčíte, když budete dělat zkoušku na počítači.

A teď se ptáte, proč o zkoušce z esperanta píšu česky. Je mezi námi mnoho věčných začátečníků. České esperantské akce jsou mnohdy hlavně české. Aby to nebylo setkání krokodýlů, ale esperantistů, je potřeba jazyk používat. A jazyk se dá naučit docela rychle. Už za půl roku můžete mluvit plynule na úrovni B2. A když si dáte za cíl, že uděláte KER ezameno (věční krokodýli třeba na úrovni B1), tak se budete muset donutit, se esperantu opravdu věnovat. Pro zkušené pak může být výzva C1 nebo dokonce C2!

Vše o zkouškách naleznete na webu

<https://edukado.net/ekzamenoj/ker/>.

Je tam ke stažení i knížka *Esperanto de nivelo al nivelo*, podle které se můžete připravit. Ohledně témat se můžete inspirovat v knížce *Szilva Szabolcs: Pri kio temas* (dostupné v:

<https://espero.bialystok.pl/>).

Kdo se potřebuje rozmluvit nebo si chce vyzkoušet rozhovor u zkoušky, může využít Ekparolu!

<https://edukado.net/ekparolu>.

Do tajů esperantské gramatiky Vás zavede např. *Bertilo Wennergen: Detala Gramatiko de Esperanto* (dostupné on-line na:

<https://lernu.net/gramatiko>).

K pasivnímu učení přispívá též četba. Vidíte tak použití jazyka a rozšíříte si slovní zásobu. Pro knihy nemusíte chodit daleko. Můžete si vybrat z nabídky Kava-Pechu (<https://www.kava-pech.cz/>) nebo čítanky připravované paní Drahotovou

<http://www.mlboleslav.cz/esperanto/>.

Proč byste měli na zkoušku jít? Ukážete tak, že esperanto opravdu umíte. Ukážete, že to jazyk, který snese srovnání s jinými jazyky. Když budete chtít esperanto učit, ukážete, že nejste nadšenec, který je lekci před studenty. Když budete chtít přeložit leták o svém městě do esperanta, můžete prokázat, že tomu rozumíte a nepíšete nesmysly.

Najde-li se dost zájemců, mohlo by příští rok proběhnout Tutmonda ekzameno i v Česku. A Bartošovice jsou pro to ideální místo. Na hlavním železničním tahu, dostupné všem z Česka. Pokud by se to dostatečně propagovalo, mohli by přijet zájemci i z Rakouska, Slovenska nebo Polska. Může to být i jinde, podstatné je, abychom dokázali získat dostatek uchazečů a lokální organizátory, kteří vše na místě zařídí a budou v kontaktu s hlavní organizátorkou Katalin Kovacs.

Další možnosti příští rok budou on-line zkoušky a zkoušky během UK v Turíně.

Doplnění redaktora

Esperantská literatura na internetu:

Množství esperantské literatury v elektronické podobě je na internetu, najdete je např. zde:

<http://esperantobrna.cz/malnova/bitlibroj.html>

Doporučená literatura:

Auld, W.: **Paŝoj al plena posedo**

Seppik, H.: **La tuta Esperanto**

Němec, V.: **Ni parolas Esperante**
(konverzační témata)

Kalocsay, K. - Waringhien, G.: **Plena Analiza Gramatiko (PAG)**

Malovec, M.: **Gramatiko de Esperanto**
(výpisky z PAG)

Wennengren, B.: **Detala Gramatiko de**

Esperanto

Wennengren, B.: **Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (Pomego)**

Rakuŝa, R.: **Metodiko de Esperanto-Instruado**

Szanser, I.: **Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado**

Kováts, K.: **Manlibro pri instruado de Esperanto**

Vondroušek, J.: **Historio kaj Biografioj**

Lapenna, I.: **Esperanto en perspektivo**

Minaja, C.-Silfer, G.: **Historio de la Esperanta literaturo**

Při zkouškách se zkouší 15 témat, na vyšší úrovni vždy podrobněji než na nižší:

1. **Personaj kaj familiaj indikoj**
2. **Hejmo kaj ĉirkaŭaĵo**
3. **Laboro, ĉiutagaj farenaĵoj**
4. **Lernado**
5. **Komunikado**
6. **Rilato kun aliaj homoj: privata kaj publika vivo**
7. **Libertempo, amuziĝo, kulturo**
8. **Sano, sporto**
9. **Aĉetado kaj servoj**
10. **Manĝado**
11. **Trafiko**
12. **Vojaĝo**
13. **Nia medio, la naturo**
14. **La lando de la ekzamenato**
15. **Esperanto-kulturo**

Jedná se tedy o to, jak představit sebe, svou rodinu a přátele, svůj byt a město, svou profesi, školní výuku, výuku cizích jazyků, setkání či telefonování s přáteli, sledování televize, návštěvu kina, divadla, koncertu, sportoviště, lékaře, samoobsluhy, jídla, cestování, krajinu, zvířata, rostliny, svou zemi, dějiny esperanta, esperantské organizace, časopisy, literaturu, osobnosti.

Du agrablaj surprizoj dum unu sabata posttagmezo

Sabate dum la festado de 120-a datreveno de la praga Esperanto-klubo mi travivis du tre agrablajn surprizojn:

1e, alparolis min Margit Turková, ĉu mi rimarkis, ke ĉeestas ankaŭ la klarnetistino Bohunka. Mi diris, ke tute hazarde mi serĉas nomon de la klarnetistino, kiu koncertadis en Ústí nad Labem, sed tio ne povas esti ŝi, ĉar ŝi devus nun esti konsiderinde pli aĝa. Ja mi bezonis la nomon al la foto el la jaro 1994!



Koncerto dum la Kultura festivalo en Ústí nad Labem 1994: De maldekstre Bohunka Šrutová, Vlastimil Novobilský, Miroslav Smyčka kaj Jan Duda

Margit reagis *Nu ŝi ne estas tiel juna; mi ne konas alian, do devas esti ŝi*. Mi do alparolis ŝin kaj jes! Evidentiĝis, ke vere temas pri tiu Bohunka, tiam Ŝrutová, nun Převrátlová. La sekva programero interrompis mian parolon kaj mi devis foriri antaŭ la fino, do mi decidis alparoli ŝin denove dimanĉe por ekhavi ŝian retadreson. Sed ho ve! Dimanĉe ŝi ne plu ĉeestis kaj Margit kontakton al ŝi ankaŭ ne havis. Do mi ne povas sendi al ŝi la foton, sed espereble ŝi rigardos ĝin ĉi tie en Starto.

2e, kiam mi eksidis ĉetablen en la kafejo, kie okazis prelegoj kaj plia programo, restis apud mi libera loko. Venis al mi nekonata juna viro kaj demandis, ĉu li povas apudiĝi. Li prezentis sin al mi kiel Adam Káva kaj mi al li, sed li interrompis min dirante, ke li min konas kaj ke li venis precipe por ke li povu renkontiĝi kun mi.

Sekve li rakontis en flua Esperanto, ke li ĉeestis mian prelegon pri Esperanto antaŭ 15 jaroj en gimnazio dum la Eŭropa tago de lingvoj. Kaj ke ni post la prelego parolis kaj mi eĉ donacis al li la lernolibron *Esperantem za tři měsíce*. Kaj ke li laŭ ĝi vere ellernis Esperanton, sed hodiaŭ li unuan fojon parolas ĝin kun alia viva esperantisto, antaŭe li uzis ĝin nur pasive en la reto. Kia bela surprizo por mi renkontiĝi post 15 jaroj kun la rezulto de mia tiama prelego!

Parenteze, tio rememorigis al mi alian pli fruan ekscion de la frukto de la sama lernolibro. Ni longe estas amikoj kun Petro Baláž, nun prave konsiderata unu el la plej famaj esperantistoj en la mondo. Sed neniam ni babilis pri niaj esperantistiĝoj. Do kia estis mia surprizo, kiam mi aŭdis lin dum lia prelego en la Esperanto-muzeo en Svitavy diri, ke li ellernis Esperanton vere dum tri monatoj lasante sin gvidi per la lernolibro de ĉeestanta Petro Chrdle *Esperantem za tři měsíce*. Nu, ĉu io povus pli plezurigi aŭtoron de lernolibro, ol se laŭ ĝi konatiĝis kun Esperanto tiu Esperantofamulo?! Mi nur bedaŭras, ke tion ne ĝisvivis mia edzino kaj kunaŭtorino Stanjo. Cetere, Petro ankaŭ eldonis la slovakon tradukon de la pli ampleksa versio de ĝi, *Esperanto od A do Z* (Esperanto de A ĝis Z) en sia eldonejo Espero. *Teksto kaj foto Petr Chrdle*

E-MENTAL‘ EN KALABRIO

Kiel pasintjare eĉ nunjare oktobre Emental-anoj vojaĝis Italujon. Celo de la vojaĝo estis viziti pluan parton de bela mediteranea lando, ĝui belan semajnon kaj kompreneble propagandi Esperanton! Ni komencis propagandi nian movadon tuj en flughaveno en Prago kaj antaŭĝojante vojaĝon neniu rimarkis, ke ni montras nian flagon renverse! Sed dum pluaj fotadoj ni ĉiam dufoje kontrolis, kiel ni tenas la verdan flagon.



Parto de partoprenantoj flugis per aviadilo kaj la alia veturis per aŭto. Ĉiu vojaĝmaniero havas kaj avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Aŭto povas esti elŝtelita, la flugbiletoj povas esti nuligitaj. Eĉ pri tio estas memstara vojaĝado eksterlanden sen vojaĝagentejo.

Ni ĉion tion spertis kaj finfine ambaŭ grupoj renkontiĝis vendrede la 21-an de oktobro en bela kalabria urbo Salerno. Ni vizitis kaj trarigardis la urbon jam pasintjare, do ni restis nur unu nokton kaj sabate ni daŭrigis vagonare pli suden en ĉemaran urbeton Briatico, kiu estis por plua semajno nia hejmo. Ĝi situas je bordo de Tirena maro en sudokcidenta parto de la itala „boto“.

Ni prunteprenis pluan aŭton kaj naŭope per du aŭtoj ni ĉiutage faris ekskursojn por renkonti novajn travivaĵojn! Tuj dimanĉe ni vizitis *Monteroso Calabro*, malgrandan pentrindan vilaĝeton en montaro kun du mil loĝantoj. Post matena kafo kaj trarigardo de loka preĝejo ni vizitis proksiman Cristo Redentire, kie estas statuoj de Kristo simila de tiu en Rio-de-Janeiro, nur ne tiom granda.



Kaj la lasta dimanĉa haltejo estis *Ruderi di Nicastrello*, tute malplena vilaĝeto forlasita per siaj loĝantoj, kiuj foriris antaŭ kvindek jaroj por laboro al pli grandaj urboj. Kaj ĉiujare ili aŭ iliaj posteuloj revenas por partopreni meson kaj rememoradi.

Ĉiu nia tago havis firman planon. Frue matene vekigi, por ferio tio vere estis frue matene, formanĝi supon, kiu preparis ĉefino de E-mental‘ Vlasta, kaj antaŭ oka horo ekveturi al la celo, pri kiu ni interkonsentis antaŭan vesperon. En unua vilaĝeto trinki kafon kun kornobrioĉo ĝuste kiel italoj kaj daŭrigi plu. Kaj poste marŝi al memoraĵoj kaj vidindaĵoj. Entute dum semajno en Kalabrio ni marŝis cent kilometrojn, do posttagmeze ni jam estis lacaj kaj ie ni lunĉis kaj jam antaŭĝojis hejmen al Briatico, kie Vlasta preparis komunan abundan vespermanĝon. Kaj post ĝi ni planis pluan tagon.

Radmilka, kiu estadis ĉiĉeronino, ĉiam konatigis nin kun historio kaj memorindaĵoj de vizitota loko. Do ni eĉ ion lernis pri Kalabrio, ĝia naturo, historio kaj popolo.

Lunde ni tiel vizitis urbon Tropea. Ĝia historia parto estas konstruita sur la roko kaj de ĝi estas ĉarma ĉirkaŭrigardo je Tirena maro. Temas pri antikva loko kun multe da ruinoj de roma kaj greka epokoj. La urbo estas konata ankaŭ per produktado de cepo. Do ni gustumis eĉ cepan glaciaĵon! Kaj ĝi vere estis bongusta!

Kiam ni promenis en proksima urbeto Drapia, subite vokis nin sinjorino de ĝardeno kaj donacis al ni sakon da granatpomoj kaj pluan sakon da vinberoj. Nur tiel - por bona vojo! Kaj kiam ni jam foriradis, ŝi vokis nin reen kaj aldonis ankoraŭ sakon da nuksoj. Kiam lastfoje vi marŝis en alia lando kaj havanto de ĝardeno proponis al vi refreŝigon?

Pluan tagon ni vizitis urbeton Spilinga. La regiono estas konata per produktado de *'nduja*, spica ŝmiraĵo de porka viando, rostitaj kapsikoj kaj spicaĵo. Ĉar ni volis vidi, kiel oni faras tion, ni vizitis lokan urbdomon kaj tie ni petis helpon. Tuj du personoj zorgis pri ni kaj detale klarigis vojon.



En la familia firmao *Nduja e salumi Bellantone* sinjorino detale priskribis,

kiel produkti la plej bonan ŝmiraĵon kaj kompreneble la plej bonan produktas nur ili. Ni vidis, kiel oni sekigas amasojn da spicaj kapsikoj kaj poste oni muelas ilin kaj miksas kun porkaĵo kaj diversa spico. Duonprilaborita produkto estas premita en diversgrandaj saketoj kaj pluajn semajnojn aŭ monatojn sekiĝas.

Merkrede ni vizitis *Grotte di Zungri*, urbeton, kie homoj loĝis en grotoj, ĉu en artefaritaj, ĉu en naturdevenaj. En la mezepoko homoj serĉis en grotoj azilon kontraŭ marrabistoj. La unuopaj grotoj estas kunligitaj per fositaj tuneloj kaj per tiu aerumado estas prizorgite, ke en la grotoj estis dum vintro varme kaj dum somero malvarme. Ankoraŭ antaŭ nelonge ĉi tie homoj vivis komune kun hejmbestoj en unu ĉambro, aŭ pli bone en unu groto.



Hodiaŭ la grotoj estas parto de Muzeo pri arĥeologio kaj homoj loĝas en normalaj domoj kaj havas similan okupojn kaj zorgojn, kiel ĉiuj aliaj italoj.

Proksime de la muzeo estis premejo de oliv-oleo. Laboristoj vidinte nin preteriri tuj invitis nin kaj parte germane, parte itale, bedaŭrinde ne Esperante, klopodis klarigi al ni la tutan procedon de produktado. Kaj je fino ni povis eĉ gustumi puran, ĝuste premitan oleon.

Ĵaŭde ni luis boaton kaj trarigardis urbon Tropea el la maro. La akvo estis tre pura kaj ni vidis fundon eĉ dudek metrojn sub ni.

La boatluanto pruntedonis al ni subakvajn maskojn kaj eĉ spirtubojn, do ni ne rezistis kaj saltis akvon por naĝi kaj esplori marajn grotojn. En Ĉeĥio ne estas tro da eblecoj fine de oktobro baniĝi ekstere.

Posttagmeze ni ankoraŭ vizitis vilaĝeton Caria. Sur kastelo kaj ankaŭ sur preĝejo ĉi tie estas rememoraĵo je papo Jan XXIII-a kiu vizitis vilaĝon ankoraŭ antaŭ sia pontifikeco. Ni vizitis la kastelon ĝuste unu semajnon antaŭ 99-a datreveno de la vizito, je kiu vilaĝanoj diligente preparadis.



Vendrede ni ekveturis al pluaj urboj. Bedaŭrinde ni tro fidis al poŝtelefona navigacio. La elektita ŝoseo havis pli kaj pli da truoj kaj samtempe malpli kaj malpli da asfalto.

Post du kilometroj ni haltigis aŭtojn kaj daŭrigis piede por esplori, kien la vojo gvidas. La mapoj ne mensogis. La vojo vere daŭris eble ĝis al la celo de nia vendreda ekskurzo. Sed jam post kelkaj centmetroj estis videble, ke la vojon uzas nur azenoj. Ni devis reveni al aŭtoj kaj uzi anstataŭan vojon. Sed tiujn ĉi vojaĝkomplikaĵojn rekompencis bela urbo Serra San Bruno kun multe da kristanaj konstruaĵoj. Ni vizitis proksiman monaĥejon, kie estas entombigita Bruno de Kolonjo, fondinto de la ordeno de la Kartuzianoj. Li fondis tiun ĉi monaĥejon jam en la jaro 1091. La vivo de monaĥoj de tiam ne tro ŝanĝiĝis.

Revenante ni haltis ankoraŭ en la urbo Soriano Calabro. Ankaŭ ĉi tie iam staris granda preĝejo. Bedaŭrinde kelkaj tertremoj en 17-a kaj 18-a jarcento tute detruis la konstruaĵojn kaj hodiaŭ estas videblaj nur ruinoj.



Sabaton kiel lastan tagon en Kalabrio ni dediĉis al trarigardo de proksima urbo Pizzo, lulilo de fama itala deserto *tartufo*. Tartufo signifas en itala lingvo fungon „trufo“ kaj vere temas pri gelata globo kun fandita ĉokolado enigita en la centron. Tio estis dolĉa punkto post nia nunjara restado en itala Kalabrio.



Dimanĉe ni redonis la prunteprenitan aŭton kaj vagonare veturis al Bari ĉe Iona maro en regiono Apulio, kiu kuŝas je orienta bordo de Italujo. Sed tio jam estas alia rakonto kaj pri ĝi eble venonte.

Grupo de E-mentalanaj vizitis sudan Italujon jam trifoje. Kaj ĉiam estis belega vetero kaj amuza atmosfero. Ĝuste pri la lasta ekskurso prelegis Vlasta dum vendreda vespero okaze de 120-a datreveno de EK Prago. Partoprenantoj povis almenaŭ tiel ĝui la etoson de similaj vojaĝoj.

Teksto kaj fotoj E-mental

Kontraŭ atombombo

Dezirante pacon en nia terglobo mi sendas ĉi-mesaĝon al vi.

Nepre vizitu suban TTT-adreson:

<https://atomkonto.wixsite.com/hibakusha>

Mi obstine atendas eĥon (penson, opinionon iel ajn) de vi.

*UEA-dumviva membro (delegito)
HASĜIGUĈI Ŝigejuki en atombombita
lando, Japanio.*

“Akademia Laŭro”

Regularo pri literatura premio

Akademio de Esperanto starigas novan literaturan premion “Akademia Laŭro”.

Art. 1 – La premio konsistas el diplomo kaj pago de 100 € al la aŭtoro. Ĝi estas aljuĝebla al libro en Esperanto eldonita maksimume kvin jarojn antaŭ la limdato por konsiderado. La verko premiita devas plenumi la sekvajn kriteriojn: esti arte signifa, lingve perfekta kaj evidente kontribui al evoluigo de esperantlingva kulturo.

Art. 2 – La premiota libro devas esti oficiale publikigita en papera aŭ elektronika formo kaj libere akirebla en komune atingeblaj libroservoj aŭ distribuejoj de elektronikaj eldonoj.

Art. 3 – La ĵurio, funkcia en la nomo de Akademio de Esperanto, konsistas el minimume 5 membroj aprobitaj de la Akademio laŭ propono de la Sekcio pri Literaturo. Aprobo de nova ĵurio okazas dum la du monatoj post la anonco de la antaŭa premio. Verkoj de ĵurianoj ne estas premieblaj.

Art. 4 – Prezentas la libron por la premio iu Esperanto-organizaĵo (landa aŭ internacia asocio aŭ simile), eldonisto aŭ la aŭtoro mem al ajna membro de la

ĵurio, kiu plusendas al la aliaj ĵurianoj. La prezentinto disponigas la libron al la ĵurio prefere en elektronika formo. La libroj por la premio estas prezentablaj dum la tuta jaro, sed por esti konsiderata por la premio en la kuranta jaro ne pli malfrue ol la 30-an de junio.

Art. 5 – La premio povas esti aljuĝata ĉiujare, se troviĝas indaj kandidatoj. Libro povas esti deklarita gajninto de la premio, nur se la favoraj voĉoj interne de la ĵurio atingas minimume du trionojn de la plena kvanto de ĵurianoj.

Art. 6 – Ĉiujare estas aljuĝata ne pli ol unu premio “Akademia Laŭro”. Libro proponita sed ne ricevinta premion en la kuranta jaro povas ricevi la premion poste. Libro de la sama aŭtoro povas ricevi la premion ne pli ofte ol unufoje dum 5 jaroj.

Art. 7 – La rezultoj estas anoncataj la 15-an de decembro, en la Tago de Esperanto-Libro.

Laŭro de la Akademio 2021

Estis proponataj 15 verkoj de 10 verkistoj el 10 landoj: 9 eldonitaj en 2020, 1 en 2019, 2 en 2017 kaj 3 en 2016. Laŭ unuanima voĉdonado de la ĵurio, la laŭro de la Akademio estis atribuita al Mikaelo Bronŝtejn pro la verko *Mi stelojn jungis al revado* pri la jaroj 1918 – 1938, turmentaj por rusaj esperantistoj, komence plenaj de brilaj esperoj kaj revoj, sed finiĝintaj en terura tragedio. Rolas esperantistoj kaj ilia vivrigardo, kelkaj plene kaj mature figuraj, kelkaj kun pli romaneca rolo. La protagonisto estas Ernest Drezen, kies portreto aperas kovrilpaĝe. Enestas amo kaj malespero, nacio baraktanta inter esperoj kaj mizeroj.

AdE

EL NIAJ KLUBOJ

BENEŠOV

Ju pli malmultaj anoj de la klubo restas, des pli vigla estas ilia agado. Krom ĵaŭdaj kunvenoj (nuntempe ne tro regulaj, ĉar kelkfoje „ne estas homoj“), la anoj partoprenas en aranĝoj de aliaj kluboj.

Tiamaniere ni travivis vere riĉan aŭtunon 2022: septembre ni ĉeestis unutagan regionan kunvenon en E-muzeo **Svitavy**. Eble la plej atraktiva estis vizito de turo de preĝejo sur la placo. Sinjoro Richter, ĉiĉerono, tre interese rakontis pri historio de la urbo kaj la nemultaj esperanto-rigardantoj povis spekti belan urbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. La „regiona kunveno“ estis sukcesa.

Post du semajnoj okazis en **Pardubice** konferenco de ĈEA. Kvankam partoprenis ne tro da homoj, la konferenco, zorgeme preparita de la esperantistoj de Padubice, estis vere kontribua por plua agado de nia organizo. Estis elektita nova komitato, nova prezidanto de ĈEA, okazis kelkaj prelegoj, teatraĵo Ludetoj kun diablo, prezentita de studenta ensemblo el Svítavy, oni vizitis observatorion, laborejon de regiona fajrobriĝado, oni promenis tra urbo kun sperta ĉiĉerono Ladislav Hakl kaj vidis ankaŭ benkon kun nomoj de koronavirusaj viktimoj, inter ili nia Lenka Angelová.

La amuza vespero estis vere amuza, la tombolo mojosa. Dankon al la organizantoj!

Fine de septembro ni vojaĝis al **Dobřichovice**, de kie ni kun aliaj esperantistoj entreprenis piedan vojaĝon al Mníšek pod Brdy. Peniga, ŝtona vojaĝo tra arbaro dum pluvo, iam eĉ pluvego.

Sinjoro Petro Chrdle ne sukcesis aboni pli bonan veteron, tamen la ekskurso plaĉis al ĉiuj. Preskaŭ fine de la vojaĝo finiĝis la pluvo, ni trovis amikan bufedon, kie ni en naturo finfine (post la dua horo) tagmanĝis kaj poste vizitis proksiman ĉarman barokan komplekson Skalka. En la urbo mem ni ripozis en restoracio de Kája Mařík, babilante en esperanto. Dankon al la ĉeforganizanto Petro!



Komence de novembro okazis en urbeto **Vrďy**, en loka biblioteko, solena kunveno okaze de 150-a datreveno de naskiĝo de F. V. Lorenc. Post interesa prelego pri personeco de nia fama samlandano ni esciis, ke inter la aŭskultantoj estas vera parenicino de F. V. Lorenc, lia pranevino!!! Ŝia fraŭlina nomo estis Lorencová.

Ni, esperantistoj, estis tre surprizitaj kaj ĝojigitaj.



Meze de novembro ni vizitis E klubon en **Mladá Boleslav**. Tie la klubgvidantino Jindřiška Drahotová preparis aranĝon por esperantistoj kaj aliaj interesuloj: renkontiĝon kun sinjoro el Francujo, vojaĝanto tra multaj landoj, edziĝinta al ĉina esperantistino. Vere interesa rakontado en Esperanto kaj la ĉeĥa lingvo, kun belaj lumbildoj. La posttagmezo vere amuzis ĉiujn, dankon al Jindřiška!

Pli poste, ankoraŭ oktobre, okazis tritaga aranĝo de E-klubo en **Svitavy** – en Muzeo de Esperanto solena inaŭguro de nova ekspozicio „Fakaj asocioj“. Okazis interesaj prelegoj, inter alie pri F. V. Lorenc, jublantino, poetino Eli Urbanová, Berta von Suttner, rakontado pri KAEST iam kaj nuntempe, ...

... en majesta salono de Ruĝa biblioteko okazis teatraĵo Ludetoj kun diablo, esperantlingva prezentaĵo de studentoj, nekonantaj Esperanton. Eminentaaa!!! Dankon por perfekta organizo al anoj de la E klubo Svitavy.

La lasta (ĝis nun!) estis por ni partopreno de soleno de 120-a jariĝo de E-klubo de **Praha**. Perfekta, zorgema organizo de la aranĝo kun agrabla kunveno de esperanto-konatuloj. Prelegoj, promeno tra lokoj koncernantaj historion de la klubo, vespera filmo Murdo en salona kupeo kun esperantaj titoloj kun afabla konsento de Zdeněk Svěrák, kunveno ĉe E-memorŝtono ĉe praga Kongresa palaco sur monteto Vyšehrad kaj komuna promeno en tiea areo kaj fama preĝejo.

Por momento eniris la vesperan programon operkantistino de Nacia teatro Vanda Šípová, kiu ĉefrolas en E-opero Sternenhoch. Por ni ŝi kantis unu arion de la opero. - Tre bele, bone

legeble farita estas la broŝuro 120 jaroj de E-klubo Praha. Dankon al la organizantoj de la aranĝo!

Krom tiuj ĉi personaj kunestoj ni partoprenas virtualajn kunvenojn de E klubo **Brno** kaj personajn aranĝojn „BABILADO“ en **Prago**.

Do, neniuj samideano povas diri, ke en nia Esperantujo okazas nenio. SED - ĉio dependas de sindonaj homoj, oferemaj ion organizi kaj de esperanto-geamikoj, venantaj kaj aprezantaj ne nur aranĝon, sed ankaŭ la klopodon de la organizantoj.

LChal

BRNO

La klubo havas alterne kunvenojn en la klubejo Hybešova 65a kaj rete. Tiuj retaj kunvenoj estis jam trifoje komunaj kun la klubo en Gliwice (*Milita stato en Pollando 1981-1983 per miaj okuloj, Simboloj sur tomboj, Advento kaj Kristnasko en niaj landoj*). Rete gastis ankaŭ Petr Chrdle (*UK Montreal*). En la klubo prelegas Oldřich Arnošt Fischer kaj Milan Kolka (kiu ĉion registras kaj publikigas en Jutubo). O. A. Fischer preparis libron *Aboj kaj arbedoj*.

PROSTĚJOV

La 26-an de oktobro 2022 forpasis nia multjara membrino Bohumila Pelclová, preskaŭ 100-jara honora membrino de ĈEA. La 26-an de novembro la klubo translokiĝis el Hus-placo 97 al novaj spacoj en T.G.Masaryk-placo 11. La 29-an de decembro en la klubejo okazos Silvestra kunveno kaj adiaŭo al la jaro 2022. Aliĝu al

esperanto.klubo.prostejov@seznam.cz

Sukeraĵoj bonvenaj. Kluba retejo:

<http://ek-prostejov.webnode.cz>

JUBILEANTOJ DE SEPTEMBRO, OKTOBRO KAJ NOVEMBRO 2022

Ing. Roman Branberger, Praha
Ing. František Holeček, Liberec
Ing. Jiří Hora, Hradec Králové
František Horáček, Brno
Milan Kazdera, Liberec
Zdeněk Khun, Hořice v Podkrkonoší
MUDr. Eva Kopečná, Opava
Ing. Jiří Kreuzberger, Opava
Ing. Rozalie Kusíková, Praha
Milena Ottová, Sklené
Vlasta Pospíšilová, Dřenic
Dana Sklenářová, Praha
Bohumil Staněk, Třebíč
Olga Surá, Hnojník
Zdeněk Šlosárek, Ostrava
Věra Tomíčková, Tanvald
Hana Vencovská, Příbram
Karel Vitásek, Štramberk
Pavel Vladyka, Liberec
Eva Novotná, Mladá Boleslav
Ing. Jan Bobřík, Svitavy
Lenka Bloudková, Karlovy Vary
Věra Votrubcová, Mladá Boleslav

Al la jubileantoj ni deziras firman sanon,
kontenton kaj ĝojon en iliaj pluaj jaroj!

25.11.1938 naskiĝis **Jindriška Drahotova**

En la historio de la ĉeĥa Esperantujo ne troviĝas tiom diligenta tradukanto de la Esperanta literaturo, kiel estas Jindriška. Kiel ŝi mem esprimiĝis, por Esperanto ŝi estis kaptita nur en siaj 50aj jaroj... "sed ĝisoste - tiam malfermiĝis nova etapo de mia vivo".

Dum detiama tempo ŝi okupiĝas pri jenaj taskoj: 1. Pri instruado de la Lin-

gvo 2. Pri popularigo de la Esperantomovado (en neesperantista medio, cele al la politik-socia sfero) 3. Pri tradukado de Esperantaj presaĵoj (ĉefe libroj) en la ĉeĥan. La rikolto de ŝia longjara klopodo estas riĉa - ĝi atingis 30 librojn (certe ne fine!), krom aliaj presaĵoj - ĉu Esperantaj, ĉu ĉeĥlingvaj. (Tradukon de *Maskerado ĉirkaŭ la morto* oni legas en radio po partoj). La 4a sfero de la nelacigebla Jindriška estas plej frapa kaj ĉemana: la redaktado de allogaj publikaĵoj, kiujn ŝi nomas „leĝaĵoj por miaj geamikoj“. Ŝi estas membrino de nia Asocio, do ni estas la unuaj legantoj de la publikaĵoj, kie ni trovas multon por informiĝi, cerbumadi, amuziĝi. La elekto de temoj plene respegulas la naturan karakteron de la aŭtorino. Kion ŝi esprimas, kion ŝi faras - ĉio ĉi estas plena de kompreno kaj empatio por la kunuloj.



Kio estas neforgesebla: La „seminarioj“ en Skokovy. Kaj reale kaj spiritkoncerne la Domo estis „tegmento“ por niaj kapoj same kiel por niaj spiritaj kontaktoj. La konstruaĵo ne staras plu - sed ni fermu la okulojn kaj malfermu la korojn - kaj revidu denove nian kolektivon, kies „gluaĵo“ estis kaj estas Jindriška. Ni diru kun humuro, ke „el niaj (asociaj) vicoj ŝia merito kaj gloro disvastiĝis en la tutan Esperantujon“.

Margit Turková
El AEH-Infomilo

Bohuslava Pelcová

1922 - 2022

La honora membrino de ĈEA, s-ino Bohuslava Pelcová, forpasis la 26-an de oktobro 2022, tri semajnojn antaŭ sia 100-jariĝo (ŝi naskiĝis la 14-an de novembro 1922), en azila domo en Olomouc..



Ŝi esperantistiĝis jam emerita, la unuan informon pri Esperanto ŝi aŭdis en radioelsendado. Ŝi finstudis korespondan kurson, poste ankoraŭ partoprenis diversajn kursojn kun ekzamenoj, ankaŭ en Slovakio kaj en Bulgario ŝi ricevis atestojn pri siaj scioj. Kvankam ŝi vivis en Šternberk, ŝi aktivis en EK Olomouc, instruis Esperanton en la klubo kaj ankaŭ en religia lernejo Caritas. Ofte ŝi partoprenis diversajn aranĝojn kaj kongresojn en la tuta respubliko kaj ofere akompanis handikapitan (nevidantan) amikinin PhMr. Danuše Vokáčová (1922-2017). Ili ambaŭ estis konvinkitaj, ke Esperanto donis al ili multon – bonegan aktivecon en emerita aĝo.

F. V. Lorenz - 150

La 24-an de decembro 1872 naskiĝis en Zbyslav apud Čáslav František Vladimír Lorenc, certe kiel la plej bela Kristnaska donaco por siaj gepatroj, muelisto František kaj patrino Tereza, naskita Vítková.

Kiel 15-jara li lernis volapukon kaj post du jaroj Esperanton. En sia 17-a jaro li verkis unuan lernolibron de Esperanto por bohemoj (1890 en Pardubice) kaj en Prago gvidis kurson en la restoracio U Pštrosů (Ĉe Strutoj), sed sen

granda sukceso. Li ankaŭ eldonadis ĉeĥlingvan gazeton por laborista junularo, sed sub nomo de sia pli aĝa kamarado, ĉar li estis ankoraŭ neplenaĝa. Kiel pacifisto li ne volis fariĝi soldato, tial li fuĝis al Brazilo. Tie li uzis nomon Francisko Valdomiro Lorenz.

En Brazilo li edziĝis, havis ne nur proprajn infanojn, sed ankaŭ adoptitajn. Li laboris kiel instruisto, interesiĝis pri spiritismo kaj mirigis ĉiujn per scio de multaj lingvoj, kvankam ne estas klare, kiamaniere li lernis ilin.



Juna kaj matura

Li mortis la 24-an de majo 1957 kaj postlasis ĉirkaŭ cent librojn en diversaj lingvoj, kelkajn en Esperanto.

En Rio de Janeiro ekzistas spiritisma eldonejo sub lia nomo (ĉiujare ĝi eldonas Almanakon Lorenz), en 2012 oni starigis omaĝe al li monumenton en Dom Feliciano, kie li loĝis, kaj en 2018 la biblioteko en Vrdu (apuda vilaĝo de Zbyslav) fariĝis Biblioteko de FVL.

Liajn biografiojn verkis Jaroslav Mařík, Jarmila Rýznarová kaj plej detale Vlastimil Novobilský. Siajn proprajn rememorojn li publikigis ĉeĥlingve en 1935 en gazeto *Samostatnost* (Memstarco).

-mm-

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940 členství ČES
- 06941 členství UEA
- 06942 předplatné Starta bez členství
- 06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944 poplatek UK
- 06945 kongres EEU
- 50400 komise pedagogická ILEI
- 50401 písemný kurs začátečníci
- 50402 písemný kurs pokročilí
- 50404 Paroliga kurso
- 50405 svazové zkoušky
- 50800 sekce nevidomých LIBE
- 50900 sekce zdravotníků UMEA
- 51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200 sekce informatiky
- 70100 komise pro tisk a inf.
- 80200 ediční fond
- 80300 propagace v tisku
- 80400 fond Tilio
- 80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. 723 672 335. Předplatné uhradíte na účet u **Raiffeisenbank**, č. ú. **101 953 9617/5500**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1450,- Kč (*970,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".*)

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (<https://sezonoj.ru/>), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

Estas tri abonkategorioj:

1. Abonanto – 400 Kč
2. Amiko – 800 Kč
3. Patrono – 2600 Kč

Ni ricevis demandon, kiu aŭtoris emblemon de ĈEA.

En la jaro 2008 estis elektita propono de Jindřich Havlík el Prago.



Periodikum Ĉeského
esperantského svazu, z.s.
53. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč
Členská evidence a změny adres:

p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2023

Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 53-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 1.2.2023

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en
Eventaservo.org
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz)

Ĉiun duan merkredon virtualaj kunvenoj de
E-Klubo en Brno - gastoj bonvenas!

Fizikaj renkontoj en Hybešova 65a alternas kun
la virtualaj. <http://esperantobrna.cz>
info: brno@esperanto.cz

2022-12-04 Marcipana Kristnasko en Svitavy
Info: svitavy@esperanto.cz

2022-12-15 Kristnaska kunveno en EK Prago
Info: prago@esperanto.cz

2022-12-15 Zamenhof-Tago en Prago
Info: e-mentalprago@seznam.cz

2022-12-15 Pastorela - aŭtoro legado de Věra
Ludíková, Karolíny Světlé 286/18, Život 90,
17 h, Esperanton legos Margit Turková

2022-12-29 Silvestro en Prostějov
Info: esperanto.klubo.prostejov@seznam.cz

2023

2022-12-27/2023-01-03 19-a Novjara
Renkontiĝo en Wiesbaden
Info: esperanto.land/nr

2022-04-03/10 39-a PSI Wittenberg
Info: <https://psi.esperanto.de>

2022-05-06/12 74-a IFEF-kongreso en
Antverpeno
Info: <https://ifef2023.net/>

2023-07-08/16 Somera Esperanto-Studado en
Trenčín
Info: ses@ikso.net

2023-07-29/08-05 La 108-a Universala
Kongreso en Torino
Info: <http://uk.esperanto.net/2023>

2023-09-29/10-01 ĈEA-konferenco en Suda
Moravio
Info: komitato@esperanto.cz





Tago de lingvoj en gimnazio de Svitavy



120 jaroj de EK Praha ĉe la E-ŝtono antaŭ la Palaco de Kulturo, kie okazis UK en 1996



Inaŭguro de nova ekspozicio en nia muzeo



E-mentala ekskurso el Dobřichovice al Mníšek pod Brdy



120 jaroj de EK Praha sur insulo Žofin, kie okazis UK 1921



Prelego de P. Chrdle en la Biblioteko F. V. Lorenc en Vrды